1. Unu el la plej grandaj kaŭzoj de malmikeco inter la diversaj landoj de la mondo estas manko de sciĝ. Tiuj, kiuj ne konas unu la alian, facile fariĝas viktimoj de antaŭjuĝoj kaj miskomprenoj.

2. Kvankam la edukaj sistemoj de la diversaj landoj povas multon fari por kulturi en la mensoj de siaj lernantoj informitecon kaj malfermitecon al aliaj popoloj, ankoraŭ pli valoraj ol abstraktaj lecionoj estas rektaj kontaktoj.

3. Kvankam la gazetaro kaj aliaj komunikiloj povas helpi ĉiujn civitanojn informiĝi pri aliaj popoloj, senpera komunikado inter homoj el diversaj landoj estas la plej bona maniero forigi antaŭjuĝojn kaj firmigi la komprenigon.

4. La senpera kontakto postulas komunan lingvon. Se homoj parolas malsamajn lingvojn, ili ne povas senpere komunikiĝi. Kvankam lernado de aliaj naciaj lingvoj estas valora maniero transponti tiun dividon, la internacia lingvo Esperanto konsistigas aparte facilan kaj efikan vojon por atingi internacian interkomprenigon je tutmonda skalo kaj ĝi estas la plej bona enkonduko al la lingvolernado.

5. Esperanto - pro sia simpleco, logiko kaj tuta strukturo - estas ne nur lingvo taŭga por ĝenerala lernado, kiel la dua lingvo por ĉiuj, sed tra cent jaroj da utiligo en ĉiuj sferoj de la homa vivo, ĝi fariĝis plene esprimiva kaj fleksebla kaj ĝiaj parolantoj troviĝas en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo.

6. La mondaj problemoj, kiuj bezonas pritrakton je tutmonda skalo, ĉiam plimultiĝas. La demandoj de ekonomia evoluigo, de malarado, de malsato, de malsano, de analfabeteco, de mediprotektado k. s. postulas komunan kaj egalecan aliron pere de rekta komunikado en komuna lingvo. Regado kaj solvado de tiuj problemoj povas efike okazi nur per plena partopreno de civitanoj je ĉiu nivelo.

7. Tial, ni rekomendas al ŝtatestroj, registaroj kaj kompetentaj aŭtoritatoj kaj instancoj de ĉiuj landoj utiligi Esperanton kiel studobjekton en lernejoj kaj ebligi rektajn homajn interŝanĝojn inter siaj ŝtatanoj kaj homoj el aliaj landoj pere de la Internacia Lingvo.

8. Ni firme kredas, ke el tiu rekta interŝanĝo ekestos pli klara interkomprenigo inter unuopaj homoj de ĉiuj landoj. Tio kondukos al redukto de streĉiteco, al pli granda malfermiteco inter la popoloj, kaj al pli paca kaj libera mondo.

Ni invitas ĉiujn homojn de bona volo, kiuj konsentas kun tiuj ĉi principoj, apogi tiun ĉi Deklaron kaj tiel sin dediĉi al antaŭenigo de interkomprenigo inter ĉiuj homoj de la mondo.

Interna rezolucio

La 72a Universala Kongreso de Esperanto, okazante de 25 julio ĝis 1^a aŭgusto 1987 en Varsovio kun 5941 kongresanoj el 61 landoj konfirmante, ke Esperanto kiel internacia lingvo, fariĝis plenmatu-
ra komunikilo, kiu estas la libera posedaĵo de ĉiuj popoloj de la mondo,
agnoskante la grandan kontribuon de sennombraj uzantoj de Esperanto dum tuta jarcento por transformi la lingvon en riĉan esprimilon de plej diversaj kulturoj, inkluzive la kulturon de la Esperanto-komunumo mem,
notante, ke la ĝenerala konferenco de UNESKO rekonis la valoron de Esperanto per siaj rezolucioj de 1954 kaj 1985,
alvokas al la Esperanto-komunumo eniri sian duan jarcenton, sekvante la daŭre validan ekzemplon de Ludoviko Zamenhof, en spirito de paco, laboremo kaj espero,
instigas la Esperanto-organizaĵojn - landajn, fakajn kaj aliajn - elserci komunajn grundon de kunlaboro kaj pli intense interŝanĝi ideojn por antaŭenigi Esperanton,
apelacias al ĉiuj aktivuloj por Esperanto direkti sin al instruado kaj praktika aplikado de la lingvo,
emfazas la neceson pliprofesiiĝi la laboron por Esperanto sur ĉiuj terenoj, alprenante aktualajn metodojn, utiligante modernajn teknikilojn kaj pli efike mastrumante la disponeblajn homajn kaj financajn rimedojn,
atentigas ke Esperanto estas parolata en ĉiuj partoj de la mondo kaj ke necesas adapti la organizan strukturon de la Esperanto-komunumo por plene speguli tiun tutmondecon,
plie atentigas pri la granda potencialo de Esperanto en la monda turismo kaj la bezono de pli multaj konkretaj agadoj sur tiu kampo,
forte rekomendas, ke en sia ekstera agado la Esperanto-organizaĵoj emfazu la UNESKO-rezolucion de 1985 kaj instigu la registarajn kaj neregistarajn organizaĵojn, al kiu ĝi estas direktita, plenumi ĝiajn rekomendojn,
substrekas, ke disvastigi la uzadon de Esperanto estas konstanta tasko de la Esperanto-komunumo sub la tegmenta gvidado de Universala Esperanto-Asocio.

Tria rezolucio

La 72a Universala Kongreso de Esperanto, okazante en Varsovio de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 1987 kun 5941 kongresanoj el 70 landoj, kaj kun la temo "Esperanto - 100 jaroj de internacia kulturo",
notante, ke la Internacia Lingvo Esperanto, el sia modesta komenciĝo en Varsovio en 1887, transformiĝis en lingvan komunumon kun parolantoj en ĉiuj regionoj de la mondo;
rimarkigante, ke dum sia viva jarcento Esperanto faris gravan kontribuon kiel peranto de kulturaj valoroj inter la popoloj kaj subtenanto de reciproka respekto kaj interkompreniĝo inter la diversaj kulturoj de la mondo;
atentigante pri ĝia kontribuo al la antaŭenigo de la scienco kaj tekniko je internacia nivelo;
konsiderante ankaŭ ĝian grandan originalan literaturon, ĝian gazetaron, ĝiajn radio-programojn, kaj ĉiujn aliajn kulturajn agadojn de la

rezolucio

de la 39-a Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio Kongreso en Katowice - Pollando

Ni, fervoĵistoj el 19 eŭropaj landoj, kunvenintaj dum la 39-a Kongreso de Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio, kiu okazis en la JUBILEA CENTJARO DE ESPERANTO 1987

A P E L A C I A S

al ĉiuj nacioj de la mondo, al ĉiuj registaroj, al ĉiuj sociaj, politikaj kaj internaciaj organizaĵoj

- disvastigadi kaj aplikadi la noblan Zamenhofan ideon pri paca kunvivado de la popoloj, pri reciproka toleremo kaj estimo sendepende de politika konvinko, religia konfeso kaj haŭtkoloro
- rekoni kiel tutmondan, kulturen havaĵon la atingojn de la centjara Esperanta movado
- akcepti Esperanton kiel oficialan lingvon en internaciaj kaj interhomaj kontaktoj
- apogi ĉiaspecan agadon de Esperanto organizaĵoj celantaj diskonigi kaj disvastigi la Lingvon Internacian.

La realigo de Esperantaj ideoj eblas nur koincide kun tutmonda paco, tial ni apogas ĉiujn porpacajn iniciatojn, apelaciantes al ĉiuj partoprenantoj de senarmigaj interkontaktoj, ke ili uzu maksimuman de bonvolo por atingi tiun plej gravan celon de la homaro, nome la senarmigon kaj firmigon de paco.

Laŭ la principoj transdonitaj al ni de Zamenhof, la mejloŝtonoj de nia vojo devas esti: espero, pacienco kaj obstino.

Ni fervoĵistoj-esperantistoj respektas ilin en nia ĉiutaga laboro, realigante samtempe la inspirojn de tiu ĉi rezolucio, helpanta atingi la ĉefan celon de ĉiuj popoloj: la daŭran, tutmondan pacon.

Esperanto-movado;

agnoskante la kreskantan atenton, kiun Esperanto ricevas en universitatoj kaj esplorinstitutoj tra la mondo;

emfazas, ke Esperanto plene evoluos nur per konstanta plialtigo de la lingva nivelo de ĝiaj parolantoj kaj daŭra uzigo en ĉiuj vivosferoj;

atentigas pri la neceso pli intense konigi la Esperanto-kulturon inter ne-parolantoj de Esperanto;

alvokas al pli intencaj klopodoj normigi kaj larĝigi la fakon terminaron de Esperanto, tiel ke ĝi plej efiĉe kontentigu la bezonojn de la internacia scienco kaj tekniko;

rekomendas al ĉiuj edukaj kaj sciencaj institucioj, kulturaj instancoj, bibliotekoj, informcentroj kaj universitatoj, ke ili dediĉu seriozan atenton al Esperanto kaj al la rolo, kiun ĝi ludis, ludas kaj ankoraŭ ludos en la monda kulturo;

kaj konstatas, ke, enirante sian duan jarcenton, Esperanto kaj la Esperanto-kulturo meritas la agnoskon de ĉiuj, kiuj celas la reciprokajn interŝanĝon de kulturaj valoroj kaj la kreo de pli granda internaciisma sento de la homoj el ĉiuj landoj.

POR LA JUBILEA FONDUSO

- J. Rytichová, Teplice
 L. Větrová, Olomouc
 S. Majer, Troubelice
 I. Šolcová, Martinice
 N. Michálková, Opava
 M. Školníková, Lány
 M. Reichmanová, Hovorany
 P. Stěpánek, Podbořany
 M. Slavík, Osek
 V. Kasal, Plzeň
 M. Nettwalová, Ostrov n. Ohří
 H. Vencovská, Česká Lípa
 J. Rybář, Železnice
 V. Severa, Praha 2
 M. Haluzová, Brno
 G. Sochová, Kopřivnice
 K. Taflířová, Grešlové Mýto
 S. Weisserová, Bělý
 A. Dvořák, Rýžoviště
 Doc. Dr. S. Spryncová CSc.,
 Olomouc
 V. Paloc, Havířov
 P. Kohoutová, Nový Bydžov
 L. Chaloupková, Světice
 B. Hlaváčová, Brno
 Ing. J. Krob, Kladno
 V. Chalabalová, Plzeň
 H. Salfická, Holice v Čechách
 L. Dvořák, Praha 1
 J. Danová, Brno
 MS Frýdek-Místek
 Ing. L. Beneš, Ml. Boleslav
 G. Voda, Třebíč
 M. Šteflová, Praha 10
 J. Drlíková, Beroun
 M. Nezval, Brno
 M. Červenka, Březolupy
 K. Fiala, Žizníkov
 P. Šourek, Bratiškov
 J. Bodeček, Mikuleč
 EK Mnichovo Hradiště
 J. Pils, Praha 4
 J. Středová, Broumov
 MUDr. V. Nekuda, Brankovice
 M. Trakalová, Mírová
 J. Harcuba, Praha 6
 V. Zatloukal, Kolín
 M. Stanková, Brno
 MS Ostrava
 Z. Maroušková, Č. Budějovice
 S. Vrána, Rašovice
 J. Dubinová, Nymburk
 J. Kašpárek, Nížkov
 Z. Dušková, Písek
 Ing. J. Blažková, Praha 4
 M. Pánková, Český Těšín
 J. Doležalová, Ždár n. Sáz.
 J. Toufar, Brno
 J. Bruthans, Vrdy
 J. Bruthansová, Vrdy
 Dr. J. Bina, Brno
 F. Sokorka, Třebíč
 V. Onesorková, Litomyšl
 Ing. M. Pališín, Písek
 A. Franc, Sedlonov
 K. Bartošová, Svitavy
 I. Mičunková, Rožnov p. R.
 L. Janů, Světlá n. Sáz.
 Ing. J. Žáček, Stodůlky
 N. Břízová, Úsobí
 A. Tolevová, Orlová Rтынě
 Dr. Muzikář, Perník
 J. Vančura, Praha 2
 O. Háková, Dolní Radomí
 V. Kohlertová, Nové Město
 Ing. M. Blažek, Brno
 J. Halama, Varnsdorf
 K. Staňková, Pardubice
 Ing. M. Petrák, Olomouc
 S. Kapišinská, Svitavy
 T. Bozkovec, Brno
 sekce invalidů
 V. Stibůrek, Benešov
 J. Voják, Dřívay
 M. Ondráková, Brno
 Z. Kadlec, Tři Sekery
 Z. Jonáš, Ml. Boleslav
 B. Pivoňka, Praha 4
 M. Kavanová, Vodňany
 L. Šaršon, Svitávka
 J. Volná, Frýdek-Místek
 M. Volný, Frýdek-Místek
 František Putala
 V. Foubík, Miletín
 MUDr. V. Šimeček, Vokovice
 J. Kadlec, Nové Město na Mor.
 D. Průšová, Říčany
 J. Šabatová, Kladno
 V. Částek, Proseč
 F. Stranánek, Paskov

loka vivo



Haviřov.

Vendrede en la lasta semajno de julio arangis la E-Klubo en Haviřov solenan renkontigon kunigitan kun roŝtado de ovaĵoj kaj kolbasoj ĉe la domo de profesoro Miloslav Pastrnák en Dolní Suchá. Partoprenis 20 gesamideanoj, plejparte kursanoj de lastaj du lernoĵaroj. La kunveno malfermis prof. Pastrnák, bonvenigis ĉiujn ceŝtanojn kaj poste interese parolis pri lokaj esperantistaj aferoj kaj ankaŭ pri la rolo de la esperantista movado en la internacia paca agado. La kunveno okazis proksime ĉe lia domo en libera naturo, en malgrandeta valo, kiu estis ŝirmita per potencaj aĝaj folioarboj kaj arbustaro. Poste samideanoj ekbruligis fajron, rondsigidis sur provizore arangitaj benkoj kaj komencis baki kaj roŝti la alportitajn ovojn kaj kolbaso-provizojn. Ni ĉiuj satmanĝis.

Poste la profesoro interese rakontis pri proksima karbo-minejo "Dukla", pri la geologia formacio de tiu tereno, pri karboprovizoj sub la tero. Inter alie li sciigis la partoprenantojn, ke sub lia domo en profundaĵo de 300 metroj estas potenca kvarmetra karbotavolo, kiu estos en proksima tempo ekspluatata, ke eble tio estas jam lasta tradicia E-renkontigo ĉe lia domo kaj ĝardeno, ĉar ĉe la planita karbo-ekspluatado estigos ŝanĝoj de la ter-supraĵo pro subminado kaj domaĝoj sur la domoj. Logantoj devas esti ellogigitaj el la subminitaj terenoj. Poste komenciĝis libera amuzo.

Nia klubo arangis ankaŭ ekspozicion en la Socia domo en Haviřov. Materialon pruntedonis preskaŭ ĉiuj membroj de la klubo kaj la ekspozicion arangis s-ano Zd. Heiser. (Zdeněk Krowca)

Jablonec n. Nisou.

La tradicia Internacia Esperantista Pacmarŝo okazos sabate la 23-an de aprilo 1988. La klubo preparas esperantistan kaj turisman renkontigon en la kabano MAD PROSEČÍ inter la urboj Jablonec kaj Liberec. La "novaĵo" estas, ke vi povos elekti la distancojn inter 5 - 35 kilometroj. Tiamaniere oni kontentigos familiojn kun infanoj, pliaĝulojn kaj ankaŭ pli kapablajn turistojn. Post alveno inter la 10-a ĝis 15-a horo ĉiuj ricevos diplomon kaj memoreblemon. Aligintoj ricevos dum aprilo ekzaktajn itinerojn. Tradicia internacia vespero post la marŝo okazos sabate je 19.30 h en KULTURCENTRO en Jablonec, U balvanu. Partoprenos reprezentantoj de distrikta packonsilio kaj aliaj gastoj. Aligu rapide, se vi mendas tranoktadon ĵem ekde vendredo. Limdato: 29-a de februaro 1988. Adreso: ESPERANTO, p.s. 190, 466 21 Jablonec n. N.

La Esperantista Klubo ĉe Kulturcentro (KaSS) en Jablonec nad Nisou kunvenas regule ĉiam lunde inter la 19-a kaj 21-a horo en la klubejo de "Dům vzdělávání KaSE" apud la teatro - 3-a etaĝo. Regule funkcias ankaŭ la filioj en Tanvald, Železný Brod kaj Turnov. (E-Info - sept.87)

Kladno.

"Tra la regiono de karbo kaj ŝtalo" estas titolo de bele presita kaj ilustrita broŝuro, kiun eldonis la Urba kultura centro en Kladno. La tekston de D-ro Krajiník esperantigis prof. Vondroušek, ilustris Marcela Pižmanová. Gratulon al la viglaj kladnanoj!

Olomouc.

La Esperanto-klubo ĉe Parko de Kulturo kaj Ripozo eminente aranĝis la 5-an kongreson de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj pro tio meritas rekonon kaj dankon de ni ĉiuj. Okaze de la kongreso oni aperigis ankaŭ du broŝurojn pri Olomouc. La unua havas titolon "Olomouc - urba rezervejo de monumentoj", verkis ĝin Bohuslav Smejkal, tradukis Jan Smejkal kaj eldonis la Urba nacia komitato en Olomouc. Bela 40-paĝa presita broŝuro kun multaj fotografaĵoj, kun praktika poŝformato, enhavas priskribon de multaj arkitekturaj kaj historiaj valoraĵoj en la centro de la urbo. La dua broŝuro, grandformata, tajpita kaj ofsete presita, estas fakte plano de la urbo kun klarigoj. La kongreso kaj ankaŭ la eldonitaj materialoj montras la viclecon kaj gravecon, kiujn havas la Esperanto-klubo en Olomouc.

Praha.

Augusto en la Praga klubo tute ne estas feria monato, la klubo ĉiam regule kunvenas kaj rikoltas multajn eksterlandajn vizitojn. Lunde, la 3-an de aŭgusto, vizitis nian klubejon en Vršovice gesamideanoj el Japanio (2), el Francio (2), el Norvegio (1), el Svedio (3). Kvankam ili estis el diversaj mondanguloj, tamen ni kune travivis carman vesperon en amika etoso, kun vigla diskuto, multa rakontado kaj reciproka simpatio.

La saman semajnon, la 7-an, ni devis kromkunveni, por plenumi la deziron de alveturinta usona grupo de 13 homoj. Ili devenis el diversaj ŝtatoj kaj urboj de Usono, estis diversaj, plejparte pli aĝaj, tamen ege viglaj kaj agemaj. En Vejvodova-klubejo ekestis unu granda familia rondo kaj la etoson oni eĉ priskribi ne kapblas. Kaj la gastoj kaj ni konstatis, ke simila festo malofte okazas. Malfrue nokte ni adiaŭis nin felicaj pro la ĵus plezure travivita tempo.

La 10-an vizitis nian regulan kunvenon ĉefdelegito de UEA por Usono, lia edzino, prezidentino de Regiona Esperanto-Asocio de San Francisko kaj direktorino de Esperanto-Vojaĝ-Servo Oakland. Ilin akompanis du ege simpatiaj samideanoj, unu el ili kantistino, kiu promesis sendi al ni kasedon kun Esperantaj kantoj, kiujn si mem surkantis. Ŝi aperigis eĉ du gramofondiskojn, ili ĉiuj estis ravitaj de nia urbo kaj oni povas nur bedaŭri, ke tiun ĉi kvaropon ne spertis pli da klubanoj.

La 17-an ni bonvenigis viziton en GDR kaj fine de la monato el Finnlando, ambau bonaj amikoj de nia klubo. S.

Vítkovice.

La kunvenoj de la klubo okazas dufoje monate, kaj nome ĉiam en la unua kaj tria merkredo de la monato kun jena aranĝo: de la 17.30 ĝis la 18.00 horo estos konversacia duonhoro, de la 18.00 ĝis la 19.30 horo estos la ĉefa programo kaj post la 19.30 h. sekvos libera amuzigo. Oni proklamis konkurson pri la grafika aranĝo de la titolpaĝo kaj nomo de la kluba cirkulero. (Anoncanto)

Nordmoravia Regiono.

Ing. Karel Janouš prilaboris Statistikon informilon de Nordmoravia departementa komitato de perantoj kaj Ing. Surý disponigis ĝin al nia redakcio. La sezono 1986/87 en norda Moravio aspektis jene: ekzistis 15 kluboj, el kiuj tri kun propra jura subjekto (Ostrava-Vítkovice, Pířerov kaj Šumperk), 6 ĉe kulturaj kaj klerigaj institucioj; entute estis 531 membroj, 235 kursanoj kaj 22 instruistoj en la regiono.

KONVERSACIO por progresintoj



Dekunua temo: INSTRUADO, LERNADO, SCIENCIOJ.

Plej ofte la infanoj komencas frekventi lernejon ekde la sesa jaro de sia aĝo. En ŝtatoj estas diversaj sistemoj de lernejoj, sed oni povas ĝenerale distingi: unuagradajn, duagradajn, mezgradajn kaj altajn lernejojn. En la unuagradaj lernejoj oni lernas legi, skribi kaj kalkuli, poste oni ekkonas fundamentojn de unuopaj sciencoj. La lernantoj lernas, la instruistoj instruas kaj ekzamenas, ĉu la lernantoj bone ellernis. Oni frekventas dum unu instruaro unu klason, en ĝi estas same aĝaj lernantoj. Oni legas en lego-kaj lernolibroj kaj skribas en kajoroj per plumo, fontplumo kaj inko aŭ per kraĵono kaj globkraĵono. La instruisto skribas sur la tabulo per kreto. Nuntempe estas multaj teknikaj helpiloj per instruado, magnetofonoj, gramofondisko, filmoj, diafilmoj, televidiloj, radioaparatoj, projekciiloj kaj aliaj. La instruado okazas en same longaj lecionoj, kies komencan kaj finon anoncas sonorilo aŭ alia signalo. Inter lecionoj estas paŭzoj. Post kelkaj lecionoj la lernantoj forlasas la lernejon kaj skribas hejmajn taskojn kaj ekzercojn. Al la fino de la instruaro la lernantoj ricevas diplomojn, kie estas notoj de unuopaj fakoj. Se ili estas sukcesaj, ili rangaltigas en la superan klason post ferioj. En diversaj klasoj estas diversaj lernofakoj kaj lecionplanoj. La pedagogio estas scienco pri instruado, instrumentadoj kaj edukado. Plenkreskuloj lernas en kursoj, kiuj finas ankaŭ per ekzamenoj, en prelegoj, per legado de libroj kaj spektado de filmoj. Ili estas memlernantoj aŭ autodidaktoj. Ili povas partopreni en perletera aŭ skriba lernado, vespera lernado kaj memlernado. Studado estas pli memstara lernado en superaj lernejoj.

En la familio ellernis la infano sian gepatren lingvon. Sed iam ĝi ne prononcas bone kelkajn sonojn, palatprononcas, lispas kaj ŝosiblas. Se ĝi plurfoje ripetas la komencan silabon, ĝi balbutas. Alia manko estas nezparolado kaj raukado. La logopedio helpas forigi mankojn de la ĝusta prononcado. La parolado konsistas el vortoj, kiuj dividiĝas en silaboj. En ĉiu silabo estas unu tona vokalo kaj pluraj bruaj konsonantoj. En plursilabaj vortoj estas unu silabo pli laŭta, nome akcentita. La parolado okazas per buŝo. Oni eligas aeron, kiun tremigis kaj modulis voĉmembranoj, buŝkavo, lango, dentoj, iam eĉ nazo. Prahomo aligis nur kriojn kaj grakojn.

La vortoj havas siajn signifojn, ili estas signaloj de nocioj, konceptoj kaj ideoj. Substantivoj estas nomoj de homoj, animaloj kaj objektoj, tiuj nomigas konkretaj, nomoj de ideoj, ecoj, ŝtatoj kaj agadoj estas abstraktaj substantivoj. Adjektivoj diras ecojn de substantivoj, adverboj esprimas ecojn kaj cirkonstancojn de verboj. Verboj esprimas agadon, situon aŭ staton de substantivoj. Numeraloj esprimas nombrojn, prepozicioj diversajn rilatojn, pronomoj anstataŭas substantivojn aŭ adjektivojn, konjunkcioj kunigas vortojn kaj frazojn. El prahomaj grakoj kaj krioj restis interjekcioj. Onomato-

peaj interjekcioj imitas diversajn sonojn. Artikolo esprimas la difinecon de substantivo. La vortoj havas bazon aŭ radikon, antaŭe estas prefiksoj, poste estas sufiksoj kaj finaĵoj. Oni parolas pri radiko kaj afiksoj. Vortoj el la sama radiko estas derivitaj, parencaj. Iam oni uzas eĉ vortgrupon. Vortoj, vortgrupoj kaj frazaĵoj de certa fako estas terminoj, la derivado kaj sumo estas terminologio. Sinonimoj estas vortoj, kies signifo estas sama aŭ proksima. Homonimoj estas malsemsencaj vortoj, sed same sonantaj. Propozicio estas ideo esprimita per vortoj, frazo estas kunaĵo de vortoj kiu prezentas kompletan sencecon. En kelkaj lingvoj estas en propozicioj kaj frazoj la vortoŝanĝo grava. La homoj parolas diversajn lingvojn diferencajn pli aŭ malpli. Lingvoj dividiĝas en dialektoj aŭ idiomoj de certa regiono aŭ slangoj de certa societo. La gramatiko strebas normigi la paroladon, por ke ĉiu komprenu. La esprimado de frazoj an la alia lingvo estas tradukado. Se ĝi okazas senprokraste, ĝi nomiĝas interpretado.

La parolado de unu homo estas monologo, se parolas pluraj homoj, estas dialogo. Se la dialogo havas certan temon, ĝi estas konversacio. Se la temo estas malgrava, oni babilas. Por instrui oni prelegas, por propagando oni oratoras, en katedraloj la pastroj predikas. Ploro estas esprimo de malĝojo kaj doloro. Frustrado estas mallakta parolado. Se oni volas venigi iun, oni vokas. Tion, kion alia homo diris aŭ skribis, oni citas. Poemon oni recitas aŭ deklamas. Se oni diras ion interesan, oni rakontas. Dialogo inter du kontraŭuloj estas diskutado, pli akra estas disputado, se temas pri io malgrava, do estas kverelado, politike kaj science oni polemikas. En ĉiuj kazoj temas pri vortoj aŭ parolaj konfliktoj. Se oni parolas pri forestanta homo malbone, oni kalumnias. Klačado estas kolumniado ofte malprave kaj mensoga. Ofte la kontraŭulo sentas sin ofendita. Mortanta homo en agonio stertoras.

Skribado estas maniero kiel konservi la paroladon. Ĝi estas pli fida, ĉar la memoro de homo multon forgesas. La skribarto evoluis, unue estis nur noĉoj kaj nodoj, kiuj nur subtenis la memoron. La homo notis desegnojn kaj bildojn, sed pro nekapablo aŭ maltaŭga materialo aperis nur simboloj, kiuj nomiĝis ideogramoj. El ili evoluis literaturo. Plej perfekta literaturo havas malgrandan nombron da literoj, ĉiu litera prezentas unu sonon gravan por la lingvo. La vico de literoj estas alfabeto. Ekzistas diversaj literaroj en la historio: hieroglifoj, kojna, araba, hinda, ĉina, cirila, rusa. Sed plej konata estas la literaro latina, kiun uzas ankaŭ Esperanto. Ĝi havas presliterojn kaj skribliterojn majuskulajn kaj minuskulajn. Nuntempe oni skribas sur papero, tajpas kaj presas. Aliaj materialoj por skribado estis pergamento, vakso, bakota argilo, ŝtono, papiruso, ledo. Por rapida skribado estas stenografio. Ortografio instruas, kiel ĝuste skribi, ĉar oni ne povas skribi precize, kion oni aŭdas, oni devas respekti la derivadon kaj aliajn regulojn de la gramatiko. Tiel estas la ortografio etimologia kaj malpli multe fonetika aŭ fonologia. La alfabeto estas grava por vicigo en vortaroj kaj fakaj leksikonoj. La vortotrezoro ĉiam plimultiĝas kaj renoviĝas. La latina alfabeto havas nuntempe 26 literojn, novajn literojn oni havigas per diakritikaj signoj aŭ per zeŭgmoj. Pri la alfabeto kaj prononcado instruas la gramatiko, dum la sintakso instruas, kiel ĝuste kunmeti frazojn.

Oni kalkulas nombrojn. Tiujn oni notas per numeroj, kiuj konsistas el ciferoj. Matematiko estas la scienco pri kalkulado, pri numeroj

kaj numeraj rilatoj. La bazaj matematikaj operacioj estas adicio, subtrahoj, multipliko kaj divido. Krom entjeraj nombroj estas ankaŭ frakcioj aŭ nombroj, kiuj esprimas ankaŭ proporciojn. Ekvacio estas matematika demando skribita per specialaj simboloj. Ekvacion oni solvas. Geometrio studas platajn formejojn kaj spacajn volumenaĵojn. En plato estas linioj rektaj, zigzagaj kaj kurbaj. Ili limigas figuraĵojn. Oni desegnas ilin per liniilo, cirkelo kaj kurbilo. La figuraĵoj havas laterojn aŭ arkojn. La longeco de ĉiuj lateroj kaj arkoj sume estas perimetro de figuraĵo. Plue oni kalkulas areon. Ĉe volumenaĵoj oni distingas surfacan areon kaj volumenon. Gravaj figuraĵoj estas: kvadrato, ortangulo, triangulo, trapozo, cirklo, elipso. Gravaj volumenaĵoj estas: kubo, paralelepipedo, prismo, piramido, cilindro, konuso, globo. Kelkaj estas sekcitaj. Analitika geometrio kunigas kalkuladon de aritmetiko kaj geometrion. Ties ekzemplo estas grafikaĵoj kaj diagramoj. Deskriptiva geometrio ebligas desegni tridimensiajn volumenaĵojn sur dudimensia papero. Tion bezonas ĉefe arkitektoj kaj konstruistoj. Se ne sufiĉas grundĉef- aŭ flankekizo, oni konstruas modelon aŭ skulptan skizon. En la matematiko kaj fiziko necesas mezuri kaj pesi multajn nociojn. Ekzistas tutaj sistemoj de mezur- aŭ pezunuoj por diversaj nocioj.

GRAMATIKO: 1. Elektu kvin frazojn kaj strebu difini en ili specojn de vortoj. 2. Nomu la finaĵojn de Esperantaj vortospecoj. Kiu rilato en Esperanto ne estas esprimita per prepozicio, sed per finaĵo? 3. Trovu tri taŭgajn radikojn kaj skribu el ili plej multe da derivitaj vortoj. Ekzemplo: radiko "hom": homo, homaro, senhoma, homeco, homigi k.a.

STILO: 1. Priskribu la sistemon de lernejoj en via lando. 2. Elektu kalkulecilon kaj skribu ĉion, kion vi faras, per vortoj.


Ekzemplo: 265 Oni komencas subtrahi de dekstre. Ses kaj kiom mankas
 -156 ĝis dekkvin? Oni skribas naŭ kaj adicias unu, kiun
 ----- oni alprenas antaŭ kvin. Unu kaj kvin faras ses kaj
 109 kiom estas ses? Oni skribas nulon. Unu kaj kiom mankas
 ĝis du? Oni skribas unu. Do la rezulto estas:
 cent naŭ.

3. Skribu kelkajn formulojn por perimetroj, areoj, surfacaj areoj kaj volumenaĵoj. Se ili estas en simboloj, klarigu ilin. Vi povas fari tiel eĉ per desegnado.

DEMANDOJ: 1. Kiujn lernejojn vi frekventis aŭ frekventas? 2. Kiu lernofako plaĉas al vi plej multe? 3. Kiam oni finas la frekventadon de la lernejo? 4. Kiel oni desegnas cirkulon sen cirkelo, ekzemple se ĝardenisto bezonas cirklan herbobedon? 5. Kiujn lingvojn vi konas? Kiujn vi kapablas mem paroli? Ĉu vi kapablas interpreti en Esperanto? 6. Kiujn diskutojn aŭ polemikojn en Esperanta movado vi konas? 7. Trovu Esperantajn vortojn, kiuj devenas el ĉefa aŭ el slavaj lingvoj!

(Josef Chvosta)

En la jaro 1988 denove atendas vin la Samera Esperanto-Tendaro en Lančov, ĈSSR. En tri dusemajnaj etapo en junio, julio kaj aŭgusto 1988 vi povos lerni Esperanton en kursoj laŭ jenaj gradoj: A - por komencantoj, B - por progresintoj, C - konversacia, D - por instruantoj kaj E - por tradukantoj. Detalajn informojn kaj aligilon petu ĉe: Esperanto-Klubo, baza org. de ĈEA, CS-674 01 TRĚBÍČ, Ĉeĥoslovakio.



KORESPONDI DEZIROJ ANONCOJ

16-jara knabinon interesas muziko, filmoj, sporto, si volas intersangi bildkartojn. Ŝia adreso: Jitka Ottová, Svojek 21, 507 91 Stará Paka.

30-jara pola esperantisto volus korespondi kun celaj esperantistoj pri vivo. Li interesigas pri velado kaj historio, kolektas postmarkojn. Lia adreso: Arkadiusz Tomaszewski, ul. Wyzwolenia 4/10, 14-300 Morag, Pollando.

22-jara aŭtisto deziras korespondi kun la tuta mondo pri literaturo, moderna muziko, sporto, turismo, reciproka gastigado, kino, li deziras intersangi mapojn, fotojn, literaturon s-f, japanan luktoarton ktp. Adreso: Aleksander Antoniak, Kozły 58, 17-100 Bielsko-B., Pollando.

21-jara bibliotekistino interesigas pri turismo, literaturo kaj folkloro, kolektas bildkartojn. Ŝia adreso: Monika Postawa, ul. Okolna 3/94, 30-669 Kraków, Pollando.

23-jara studentino interesigas pri turismo, literaturo, pedagogio, angla kaj rusa lingvoj. Ŝia adreso: Beata Kowalewicz, str. Orkana 3, PL-38-540 Zagórz, Pollando

15-jara lernanto de liceo interesigas pri literaturo, muziko, elektroniko. Adreso: Roman Zajęc, str. Krasickiego 7/26, 62-700 Turek, Pollando.

23-jara gardenistino interesigas pri floroj, kolektas postmarkojn kaj bildkartojn, ŝia adreso: Maria Kucharczyk, str. Ostrowska 75, 63-405 Sieroszewice, Poll.

20-jara studentino de jurscienco interesigas pri arkeologio, kulturo de aliaj landoj, turismo, junulara muziko kaj poezio. Si tre satas legi librojn. Ŝia adreso: Elżbieta Raczynska, ul. Armii Ludowej 15/5, 41-800 Zabrze, Pollando.

Partoprenas en internaciaj E-arangoj en diversaj landoj kaj volus kunlabori en turismo: Lech Romanek, ul. B. Chrobrego 2, PL 43-400 Cieszyn, Pollando.

Komencanto volas korespondi kun geamikoj de la tuta mondo. Li interesigas pri

tekniko, libroj, revuoj k.a., kolektas postmarkojn, postkartojn (bildkartojn) kaj glumarkojn. Adreso: Leszek Sobkowiak ul. Boczna 7/25, 67-400 Wschowa, Poll.

21-jara knabo interesigas pri literaturo, muziko, historio kaj turismo, kolektas bildkartojn. Adreso: Radosław Ragan, ul. Stefana Batorego 7/1, Katowice, Poll.

Komencanta e-istino deziras korespondi kun ciuj. Ŝi estas 50-jara kaj interesigas pri instruado kaj edukado de infanoj, kolektas pedagogiajn librojn kaj periodaĵojn, satas ekursojn. Ŝia adreso: Mgr. Małgorzata Jedryka, ul. Koziełulackiego 65, PL 96-100 Skierniewice, Pollando.

23-jara studentino, kiu ankaŭ laboras en la oficejo de Pola Ruĝa Krucjo. Ŝi interesigas pri turismo, antaŭ ĉio pri alpismo, plus pri pentroarto kaj muziko. Adreso: Lidia Kiedrowska, 89-665 Ogozieliny ZR Obkas, woj. bydgoskie, Pollando.

23-jarulo interesigas pri fotografio, muziko, turismo, sporto. Adreso: Jarosław Szreder, ul. Świętopełka 2, PL-84-200 Wejherowo, Pollando.

18-jara lernantino interesigas pri turismo, fotoarto, poezio kaj floroj, kolektas bildkartojn. Ŝia adreso: Aleksandra Rosa Paluszek, str. Krakusa 8/1, PL-82-300 Elbląg, Pollando.

Komencanta e-isto dezirus trovi amikojn por korespondado kaj intersangado de bildkartoj pri pentroarto en diversaj landoj de nia planedo. Adreso: Algirdas Mažuika, Žalgirio 6-5, 235408 Šiauliai, USSR, Lit. SSR.

Lernantoj, kiuj finis E-kurson, volas korespondi kun la tuta mondo, iliaj interesoj estas tre vastaj. Adreso: Soveta Unio, SU-252035 Kiev-35, ul. Urickogo d. 19 kv. 73, Pogorelaja Svetlana.

Hungara lernantino volus korespondi kun lernant(in)o de oka klaso: Anita Mészáros, Damjanich ú.2, 4320 Nagykálló

22-jara studento, junulara delegito de UEA, deziras korespondi kun iu juna esperantist/in/o el Ĉeĥoslovakio. Li interesiĝas pri lernado de fremdaj lingvoj, E-movado kaj turismo, sed li korespondus eĉ pri aliaj temoj. Krom Esp. li studas la rusan kaj germanan lingvojn, kolektas bildkartojn pri urboj kaj postmarkojn. Adreso: Medveczki Gábor, Ibolya v. 9, H-4027 Debrecen, Hungario.

29-jara dozimetrilo (radiodozmezuranto), edzigiinta, kolektanto de bildkartoj kaj esperantaĵoj, interesas lin la kulturo, historio, turismo k.a. temoj. Li deziras korespondi kun samagaj geedzoj aŭ kun aliaj esperantistoj. Adreso: Balázs Major, Kornis u. 10, H-7030 Paks, Hung.

17-jara lernantino volas korespondi kun ĉeĥa knabo aŭ knabino, interesas sin literaturo, astronomio, muziko kaj Esperanto. Ŝia adreso: Anikó Németh, Vörös Hadsereg u. 158, 9700 Szombathely, Hungario.

17-jara studento en la universitato pri filozofio, volas korespondi kun ĉeĥaj gesamideanoj. Li estas sciema, interesas lin ĉiu temo iomete, plej multe li ŝatas humanajn sciencojn, krom la aferoj pri Esperanto, kio estas lia ĉefa hobbio. Ankaŭ plaĉas al li ricevi kelkajn bildkartojn aŭ postmarkojn. Adreso: Alberto Bermell, c/Plus Ultra, 23-4, 46006 Valencia, Hispanujo.

17-jara inĝenierarta studento, komencanta e-isto, satus korespondi kaj ricevi informojn pri nia E-movado. Adreso: Anthony Kelly, II, Heather Grove, Ballybane, GALWAY, Irlando.

25-jara junulo intencas korespondi pri diversaj temoj: vojagoj, historio, popolaj kutimoj, naturaj sciencoj, piedmarseado ktp. Li serĉas adresojn de gesperantistoj, kiuj povas helpi lin dum lia granda vojago tra mondo per biciklo kaj piedmarse en 1988. Adreso: Aleksandro Carneiro, str. São Vicente de Paulo, S/N. Santa Barbara, Bahia, Brazilo, 44150

Pri Esperanto kaj aliaj sociaj problemoj volas korespondi, sed nur hispanlingve, Prof. Everardo Gutiérrez Sánchez,

Galle Nicolás Bravo mor 96,
H. Zitácuaro Mich. 61500 México.

ALVKO DE KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Dum la U.K. en VARSOVIO iu malhonestulo ŝtelis en la budo de la KORESPONDA SERVO de U.E.A. iun valizon enhavantan dokumentojn de la Servo, inter alie la aligilojn de tiuj, kiuj alskribiĝis dum la U.K. al K.S.M. de SABATO ĝis MARDO inkluzive. Ni petas tiujn samideanojn la plej baldaŭ skribi al KORESPONDA SERVO MONDSKALA, Les Hortensias 2. 121 bis Bvd Napoleon III. F-06200. NICE. Francujo sciigante familian kaj personan nomojn, kongresan numeron, sekson, civilan staton, aĝon, profesion, kompletan adreson, la petitajn landojn kaj temojn, la nombron de dezirataj korespondantoj.

Samarkanda Klubo de Interpopola Amikeco "Esperanto" organizas la internacian ekspozicion pri la agado por la sana vivmaniero, kontraŭ alkoholo kaj fumado en diversaj landoj. Tiucele ni kolektas ĉiulingvaj tiutemajn afiŝojn, fotojn, desegnaĵojn, insignojn, gluetikedojn, postkartojn, revuojn, librojn kaj ĉiujn ceterajn propagandilojn de la sana vivmaniero. Ni korespondas tiuteme en Esperanto, la angla, rusa, uzbeka kaj laubezone ankaŭ en aliaj lingvoj. Bonvolu sendi cion (plejeble baldaŭ) al: International Friendship Club "Esperanto" P.O.Box 76

703000 Samarkand
Uzbekistan USSR

Al ĉiu helponto ni volonte sendos laŭdezirajn memorajojn. Daŭre validas. Represo kaj nacilingvaj anonctradukoj dezirataj.

Akrobatická skupina z mesta CHEN DU z Číny hodlá v najbližších rokoch priblížiť cirkusové umenie svojej krajiny obyvateľstvu východoeurópskych socialistických štátov. Okrem našich susedov hodlajú navštíviť aj Československo. Výťažok zo svojich vystúpení, na ktoré pozývajú všetkých gesamideánov, hodlajú použiť na rozvoj čínskeho esp. hnutia. Možu samideáni pomôcť realizovať tieto plány cestou ministerstva kultúry, Čs. cirkusov ako i prípadne Čs. spoločnosti pre medzinárodné styky - Výboru čs.-čínskeho priateľstva? Peter Čmárko

OFICIALA KOMUNIKO DE LA IFER-OK

La Organiza Komitato de la "Internacia Foira Esperantista Renkontigo" (IFER) okazigos ĉi tiun semnan arangon de la 11-a ĝis la 13-a de marto 1988 en la foira urbo Leipzig (Germana Demokratia Respubliko).

La IFER-OK, konsiderante la fakton, ke faka aplikado de Esperanto en scienco, tekniko kaj kulturo en la nuntempo ludas gravan rolon, elektis por la 1988-a arango la ĉeftemon

HOMO KAJ SCIENC-TEKNIKA REVOLUCIO.

volante diskonigi la grandajn eblecojn kaj atingojn de Esperanto sur fakaj kaj kulturaj kampoj, invitas ĉiujn partoprenemulojn al ĉi tiu internacia arango, atendas denove internacian partoprenanton el multaj landoj de nia terglobo, gastigos 250 gesperantistojn dum la "Internacia Foira Esperantista Renkontigo 1988", ekpetas jam nun de fakuloj proponojn pri prelegoj ktp., kiuj rilatu al la ĉeftemo de "IFER '88",

aperigos ampleksan bultenon, kiu enhavos ĉiujn kondiĉojn de partopreno kaj kiun eblas mendi ĉe la adreso de la IFER-OK. Limdato por aligo estas la 31-a de decembro 1987! Post ĉi tiu dato aligiloj restos senraktitaj!

La IFER-OK invitas ĉi-voje fakajn asociojn ligitajn kun UEA al okazigo de iliaj jarkunvenoj k.s. enkadre de la "IFER'88". Organizo, kiuj intencas kapti ĉi tiun ofertop, turzu sin eble plej baldaŭ al IFER-OK.

Adreso: KULTURBUND DER DDR (Kulturligo de GDR)
Organiza Komitato de "IFER '88"
Käthe-Kollwitz-Strasse 115
Leipzig
DDR-7010

Familia semano dum Pasko 1988a

Germana Esperanto-Asocio invitas precipe familiojn al la "4a Printempa Semajno Internacia", kiu okazos je 1988-03-29/04-05 (paske) en la montaro Eifel, sude de Aachen kaj Köln kaj tute proksime al Nederlando, Belgio, Luksemburgio kaj Francio. La unuan fojon ĜEA guos subvencion, tiel ke la kotizoj por sep plenaj tagoj estas tre malaltaj: infanoj pagos 50 GM, plenkreskuloj 130 GM. La programon konsistigos Esperanto-kursoj, slojzado per ledo, vitro kaj papero, kantado, dancado, prelegetoj kaj multaj ekskursoj en la tutan regionon. La celo estas praktiki Esperanto-kulturon en internacia rondo de ĉiu-eguloj. Ankaŭ paroj kaj unuopuloj sen infanoj estas bonvenaj, se ili satas familiecan etoson. Ĉar estas nur 50 lokoj, petu tre baldaŭ aligilon kun pliaj informoj de Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str.2a, D-4418 Nordwalde.

Atentigo por niaj kontribuantoj!

Viajn kontribuojn por unuopaj numeroj de Starto sendu al la redakcio laŭ jenaj datlimoj:

por n-ro 4/1988	ĝis la 10-a de aprilo 88,
por n-ro 5	ĝis la 10-a de junio,
por n-ro 6	ĝis la 10-a de aŭgusto,
por n-ro 1/1989	ĝis la 10-a de oktobro,
por n-ro 2	ĝis la 10-a de decembro,
por n-ro 3	ĝis la 10-a de februaro,
	1989,
por n-ro 4	ĝis la 10-a de aprilo 89.

Precipe ni atendas raportojn pri aktivecoj de viaj kluboj kaj rondetoj, sekcioj kaj komisionoj, viajn spertojn pri la informado kaj instruado de Esperanto. Skribu koncize, konkrete kaj precipe esperantlingve!

Niajn vicojn forlasis s-ano Adolf K r i ŝ t o f el Praha, membro de ĈEA ekde la jaro 1960. Li forpasis post longa peza malsano la 7-an de aŭgusto 1987 en aĝo de 67 jaroj. Ni kondolencas al lia edzino kaj nia samideanino Táňa Křištofová.

En aĝo de 64 jaroj mortis s-ano Miloslav H a m o n el Dřívý, membro de ĈEA ekde la 1-a de septembro 1976. Nian kondolencan.

Zúčastnila jsem se 8. setkání esperantistů v Pardubicích. Byla jsem teprve první a moc se mi líbilo srdečné a přátelské ovzduší, které tři dny vládlo kulturním domem DUKLA.

Esperanto v naší rodině celý život promasuje naše maminka, které je 74 let, její zásluhou jsem si také i já udělala písemný kurs, do kterého mě bez mého vědomí přihlásila, abych prý v důchodu měla činnost. Já jsem už získala další dvě mladé ženy, kterým předávám z mých ještě malých zkušeností. Až se trochu více zdokonalíme, rádi bychom v Dašicích založili kroužek. Jako důchodkyně bych chtěla tuto ušlechtilou myšlenku prosazovat i mezi školní mládeží v zájmové činnosti.

Moje maminka napsala k příležitosti setkání v Pardubicích básně. Uznáte-li za vhodné její zveřejnění, prosím Vás o to. Maminka by měla jistě velkou radost.

Jitka Jelínková,
Dašice v Čechách

Básně k setkání esperantistů

Na celém světě matky ať různé pleti,
přejí si vroucně mír pro svoje děti.
Poctiví lidé mají dobrá srdce,
jejich kapitál jsou pracovitá ruce,
takových lidí je na světě nepřehledné
řady,

nejsou to sobci, mají život rády.
Svět se od základu mění,
pro lenochy a tyranu už místo není.
Do nesmyslných válek lidstvo hnát,
když život je vzácný a má jej každý rád.
To musí patřit minulosti,
kdy kapitál vládl bez milosti,
poddaný člověk neměl cenu,
kapitál se snoby vládl jemu.
Semkly se řady v pochody míru,
jsou dnes už mocné a mají víru.
Jednu však snahu musí mít,
jedním jazykem se domluvit.
Rodný svůj jazyk ctít a milovat,
esperanto je však nutné znát.
Piráti válek ať vidí,
přátelství, jak mocná je zbraň lidí.

Marie Deisznerová, Dašice

Imagu malgrandan kampadejon, kie en kvin kabanetoj ripozas kvin diversnaciaj esperantistoj. Prenu racion en la manon, tralegu atente jenajn informojn kaj poste respondu: Kiu el ili trinkas teon?

Kiu el ili legas krimromanon?

(Krom la cerbo vi versajne devos uzi ankaŭ paperon kaj skribilon.)

- + Austro logas en blua kabano.
- + Germano legas lernolibron.
- + Lakton oni trinkas en griza kabano.
- + Ĉeĥo trinkas bieron.
- + Griza kabano situas dekstre de la blanka.
- + Viro, kiu mangas tortojn, ankaŭ legas romanon pri amo.
- + En la bruna kabano oni mangas kukojn.
- + Kafon oni trinkas en la meza kabano.
- + Polo ripozas en la unua kabano.
- + Viro, kiu mangas fromagon, logas apude de viro, kiu legas gazeton.
- + Kukon oni mangas apude de kabano, en kiu oni legas poemojn.
- + Semideano, kiu mangas sinkon, trinkas vinon.
- + Belgo mangas bulkojn.
- + Polo logas apude de verda kabano.

(Kompilis Karel Strouha)

Solve de la enigmo el la l-a n-ro de Starto:
1907 - 1987 - okdekjara datreveno de la unua
Esperantoklubo en la urbo Nahod

DEKDU KONSILOJ POR ESPERANTISTOJ

1. Konsciu, ke vi estas la membro de tutmonda lingva komunumo.
2. KREDU la celon de Esperanto.
3. LERNU kontinue kaj ellernu la lingvon.
4. LAŬ via kapablo entreprenu ian laboron.
5. La Esperanta Literaturo estas nia kulturo. Legu, por ke vi akiru ĉi tiun kulturon.
6. KONU la historion de Esperanto.
7. NE hontu, ke vi parolas vivantan lingvon - Esperanton.
8. PRI Esperanto ĈIAM nur la faktojn diru.
9. SE Esperanto ne plaĉas al vi, ne volu ĝin reformi, sed forlasu la movadon.
10. Esperanto-amo rilatas nur al la lingvo. Ĉio alia estas ĉies privata afero.
11. La valoron de Esperanto neniam juĝu nur laŭ kelkaj ĝiaj adeptoj.
12. NE kREDU, ke ĉiu esperantisto laŭ ĉi tiuj principoj vivas.

D-ro I. Nagy

multe da sukcesoj en la

1988

deziras al vi



VIA REDAKCIO

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Karel Franc, Jiří Hanousek (grafika aranĝo), Miroslav Malovec, Jiří Patera (responda redaktoro) kaj Helena Štruncová. Presas OKP-6 LIBEREC. Transdonita al la presejo 10. 10. 1987. Jarabono 24 CSK, por eksterlando 36 CSK aŭ 10,50 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turniĝu al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Karel Franc, Jiří Hanousek (grafická úprava), Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor) a Helena Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 31000385 ze dne 18. 3. 1985. Tiskne OKP-6 LIBEREC. Předáno do tisku 10. 10. 1987. Dohledací pošta Praha 07. Snižovaný poplatek za poštovní povolen ředitelstvím pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6.4.1979



ZLATNÍK

La kooperativo de art produktado ZLATNÍK (Orafisto) produktas orajn, juvelojn el materialoj liveritaj de la klientoj. Venu por elekto el la ĉiĉa model-kolekto en niaj vendejoj dislokitajn en la distriktoj Ostrava, Opava, Frýdek-Místek, Karviná, Nový Jičín, Bruntál kaj Přerov.

Por la bezono de vasta publiko ni produktas elektran saunajn fornojn kun la povo 6 kaj 9 kilovattoj, kukofornojn, har-sekigilojn, faldeblajn turismajn sovelilojn, kombil-rikoltilojn por truktoj kaj fajfilojn por la direkto de hundoj. La produktaĵojn ni sendas remburse per poŝto.

KOOPERATIVO DE ART - PRODUKTADO

ZLATNÍK

ČK - 758 42 Opatovice 1, Smolenský nám. 7

KDS

sedláčany

NOŽÍŘSKÉ VÝROBNÍ DRUŽSTVO *

MNOHO POTŘEBNÉHO PRO DOMÁCNOST

Kuchyňské nože v širokém výběru pro každý účel, různé soupravy dárkového charakteru včetně stolovacích souprav různých typů

Kuchyňské náčiní: vidličky, otvírače konzerv a korunkových uzávěřů, jehly na masové závítky, sekáčky a polo-sekáčky na maso apod.

Manikurní náčiní: záděrkové nůžky rovné i ohnuté v moderní tvarovém provedení, nehtové nůžky rovné i ohnuté, pilníčky na nehty, a také manikurní soupravy

Pedikurní náčiní: kleště na nehty, štipky na kůžičku, rašpličky na tvrdou kůži

Nůžky k různému účelu a v různém provedení



**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07

Snížený poštovní poplatek povolen

Ředitelstvím pošt Praha

J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979